29-a jaro



LA VERDA LUPEO



30(109) INFORMILO DE ELF - AREK JUNIO 97

Offizielles Organ der ArGe ESPERANTO im VPhA

Skupina Čechů
na 3. světovém kongresu esperantistů v Cambridgi (Anglie), 10.—17. srpna 1907.



1. *A. Kroupa*, revident státni dráhy, Brno. 2. *Jos. Grňa*, odborný učitel; Jevičko. 3. Sl. *Fierlingerova*, Olomouc. 4. IngC. *Ed. Kühnl*, Praha. 5. *Th. Čejka*, učitel, Bystřice-Hostýn. 6. *J. Kranich*, prof. paedagogia, Pol. Ostrava. 7. Sl. *Fierlingerova*, Olomouc. 8. *Jos. Krumpholc*, učitel, Bystřice-Hostýn. 9. *Eug. Fierlinger*, prof., Olomouc.

POŜTKARTO KUN ĈEĤAJ PARTOPRENANTOJ DE LA 3ªUK



ANTAŬ 90 JAROJ, 10-17 08 1907, OKAZIS LA 3ªUK EN CAMBRIDGE(GB)



E-INSTRUADO DE POLICISTOJ DUM/POR LA 3ª-UK

PAROLAS LA REDAKTORO

Karaj klubaj geamikoj!

Estas vera ĝojo por mi, ke mi povas denove prezenti al vi novan numeron de nia LA VERDA LUPEO. Bedaŭrinde mi devis konstati la daŭran malkreskon de nia ELF-AREK. Tiu fenomeno estas tutmonda kaj ne nur koncernas nin, sed ĉiujn kultur-rondojn. Bedaŭrinde ankaŭ estas, ke ni pri novaj Esperantaĵoj ekscias ofte nur hazarde. Solaj fontoj estas nur viaj informoj, miaj kolektoj kaj la revuo "Esperanto".

BONVOLU PARDONI al mi, se vi longtempe atendas respondon de mi al viaj leteroj: unu kaŭzo estas, ke "mi sidas ĝisprofunde en por Esperanto-laboro". Por mia granda familio mi ankaŭ devas dediĉi certan tempon. Mi ja estas 6-obla avo. Krome mi klopodas vivteni nian lokan E-movadon, kiu pro financaj kialoj nur pene vegetas, sed almenaŭ ankorau ekzistas, kontraste al la plej multaj ekzistintaj E-grupoj dum la germana "GDR-epoko".

Ankoraŭ unu afero: mi alkutimiĝis, informi nur pri realaĵoj. ne pri "onidiroj" aŭ "sonĝoj". Eble aperos dum majo nova E-poŝtmarko, sed mi, ĝis nun, 15 04 1997, ne ricevis fidindan informon pri tio. Sole "eventoj" de januaro 1997 skribis pri tio. Tamen min en ĉiu jaro atingas informoj pri "intencitaj" novaj E-pm. Do, nur post vera apero mi informos vin.

Kore salutas vin ĉiujn via
redaktoro
RUDOLF BURMEISTER

15 04 1997

NI en radio kaj filatelaj gazetoj

Fila gazeto de BONDY apud PARIZO (F)

Tiu ĉi trimonata kluba gazeto en Bondy enhavis en la septembra numero 1996 kaj en al januara numero 1997 ampleksajn artikolojn pri la Esperanto-Filatelio, verkitajn de nia amiko SADIER. Kun la artikoloj ankaŭ aperis listo pri ĉiuj E-poŝtmarkoj kun multaj bildoj pri la E-filatelaĵoj. Menciita ankaŭ estis ELF-AREK kaj ĝia informilo: LVL.
Dankon al nia kolektamiko SADIER pri la informo.

Esperanto - Filatelio en FM - radio de PARIZO

Fine de la jaro 1996 la loka FM-radiostacio de Parizo (F) dufoje dum po unu horo elsendis prelegon pri la Esperanto-Filatelio. Prelegis nia SADIER. Dankon al li pro la informo.

Esperanto - Filatelio en la ĉina gazeto JIANGXI-A FILATELIO


Antaŭ mi kuŝas tiu ĉina fila-gazeto de 1996-10-15, kies titolpaĝa bildo estas dulingva: ĉinlitere kaj Esperanto: JIANGXI-A FILATELIO. Bedaŭrinde mi ne kapablas legi ĝin, tamen mi vidis bildon pri E-poŝtstampo de la ĉina Esperanto-Kongreso dum aŭgusto 1996 kun akompana artikolo.

Koran dankon al CAO XIONGLIN, kiu sendis ĝin al mi. Estus interese scii, kiu iniciatis la Esperantan titolon de tiu gazeto!

HISTORIO DE LA GLUMARKOJ en la germana gazeto ERINNOPHILIE

En la unua eldono de 1997 aperis la germanlingva traduko de nia HIRSCH de la artikolo el nia LVL 28(102) sur paĝo 11/12.

EKSPOZICOJ KAJ NI



Raymond BORE en SAT-AMIKARA-KONGRESO

Nia amiko SADIER informis, ke en la kadro de tiu kongreso nia amiko BORE montris ciujn Esperanto-stampojn, uzitajn en Francio kaj aliajn Esperantaĵojn.

Elda kaj Pino DÖRFLER en TRIESTO

Dum aprilo 1998 okazos en la salono de la magistrato ekspozicio de Esperanto-Filatelaĵoj kaj de aliaj Esperantaĵoj sub la titolo:

100-JAROJ DE ESPERANTO EN TRIESTO


La patronecon transprenas la Skabeno pri Kulturo de la Triesta Kommunumo. Temas pri historia itinero -ekde 1898 gis 1998- de nia lingvo pere de poŝtmarkoj, bild-kaj poŝtkartoj, poŝtaj stampoj kaj eble glumarkoj.

ANONCOJ

Mi deziras interŝanĝi E-stampojn el la tuta mondo kontraŭ nestampitaj poŝtmarkoj; krome mi ankaŭ ŝanĝas uzitajn telefonkartojn:

Stanislaw FISCHER
ul. Bulgarska 8/8

PL-64-100 LESZNO



STAMPOJ

Pro redaktaj kaŭzoj ne aperis en la lasta LVL la sekvaj detaloj pri ĉinaj stampoj:

Memoriga apudstampo "TELEVIDA DRAMO", LVL-no: 1996-27, katalog-no: 143, uzita en PEKINO sub sankcio de la Pekina Posta Administracio.

Ekzistas du datoj kaj tekstoj:

A 143 ET presita stampo: 1996.3.8
Celebre al la filmado

daŭrigo: ĉinaj stampoj:

B 143 ET normala stampo: 1996.4.15
Celebre al la ekdissendo

La stampo troviĝas sur la TUT-PK "Televida dramo" (bildo en nia antaŭa LVL, paĝo 9).

La stampon desegnis gesamideanoj TAÑ AILING kaj XIE SHAOXING. Klarigajn informojn sendis GAO ZHENXING kaj QIN KAIJI. Al ambaŭ koran dankon!

Kompletigaj informoj pri aliaj stampoj

Grafikistoj de la subaj ĉinaj stampoj estis TAN AILING kaj XIE SHANOXING:

LVL-no: 1993-48 - 49 -- katalog-no: A 182 NET - B 182 NET

LVL-no: 1996-24-25-26 kaj 27 -- katalog-no: 143 ET-144 ET-150 ET-151 ET

La grafikisto por aliaj stampoj el 1996 estis nia ZHANG LINRUI:

LVL-no: 1996-28-29-30-31-32-33-34-35-36-37-38
katalog-no: NET 263-264-265-266-267-268-269-270-271

Memorkoverto "FONDIĜO DE XIAMEN-A ESPERANTO-ASOCIO" kaj stampo:
LVL-no: 1996-37, katalog-no: 151 ET

Eldonita de: Filatela Kompanio Xiamen en kunlaboro kun la "Xiamen-a Esperanto-Asocio.

La koverton desegnis: WU SHIFENG,
la bildo montras: E-stelon antaŭ pejzaĝo kun ŝipo,
super la bildo epigrafo, farita de BINGXIN en la ĉina:
"KONI ESPERANTON - KONI LA MONDON"

dorsflanke: En la ĉina skribo klarigoj pri Zamenhof kaj Esperanto:

厦门市世界语学会成立大会纪念

世界语是波兰医生柴门霍夫博士（1859--1917）创造并于1887年公布于世的。本世纪初，世界语传入我国，也在厦门播下火种。

绿星映环宇，前辈催后生。在厦门经济特区二次创业之际，鹭岛的世界语者怀抱Esperanto的崇高理想，愿不断学习、宣传、推广世界语，为特区建设再创辉煌而努力奋斗

为纪念厦门市世界语学会成立，特制纪念封一枚，以资纪念。

厦门市世界语学会
厦门市集邮公司

封、戳设计：吴志锋



Dekstre la simbolo de la Filatela Kompanio de Xiamen.

Dato: 1996,6,2. (junio)

daŭrigo : ĉinaj stampoj

Sube dekstre estas surpresita stampo, farita de la Xiamen-a Filatela Kompanio.

PLIGRANDIGITA STAMPO

Bildo: E-stelo kaj teksto en ĉina skribo pri la fondiĝo

Sendita en originalo de nia SONG SHENGTAN. La klarigoj venis de nia QIN KAIJI. Dankon al ambaŭ.

PK-tutaĵo "MAO DUN" kun la stampo.
LVL-no: 1996-38, katalog-no: 146 ET

daŭrigo: ĉinaj stampoj

Temas pri ĉina "E-memorkarto", aperigita de Ĉina Esperanto-Ligo kaj Pekina E-Asocio pere de la "Pekina Posta Administracio" okaze de:

LA 100-A NASKIĜ-DATRREVENO DE KAMARADO MAO DUN,
VERKISTO, SOCI-AKTIVULO KAJ ESPERANTO-SUBTENANTO

Grafikistoj: XIE SHAOXING kaj TAN AILING
Surpreso verdkolora sur PK-TUT 10-fena (1992 JYY)
Ĝi aperis: Pekino, 1996 julio 4

KLARIGOJ:

1 (1) Epigrafo de ĉina verkistino BINGXIN:

"Memore al la 100-a naskiĝ-datreveno de MAO DUN"

(2) De MAO DUN skribitaj vortoj en la jaro 1944 por la celebrado de la 4-a datreveno de la fondiĝo de "Chonqing-a Koresponda E-Lernejo":

"Esperanto havas noblan idealon, t.e.: por bono de la popolamaso kaj por pli bela estonteco de la homaro - MAO DUN

(3) Vortoj de BAJIN, elstara ĉina verkisto kaj Esperantisto (nur en la ĉina skribo):

"Mao Dun, kiel Lusin kaj Guo Moruo, la grandaj homoj en la literatura rondo, simpatias kaj subtenas Esperanton"

Kun ĝia surpresita memora apudstampo tiu ĉi filatelaĵo estas efika propagandilo por Esperanto inter la literatur-amantoj.

Dankon al ĈIN KAJGI, kiu sendis la klarigojn kaj la originalon.

Variaĵo de la TUT-PK "TAO XINGZHI" kun la stampo:
LVL-no: 1996-27, katalog-no: 151

En la LVL 29 (108) ni jam montris kopion de tiu TUT-PK kun nominalo de 15-fenoj. Nun mi konstatis, ke ekzistas entute 3 variaĵoj:

2 (1) 10-fena TUT-PK (serio 1992 JYY) = 1-a eldono kun 800 ekzempleroj

(2) 15-fena TUT-PK (serio 1993) = 1-a eldono

(3) 10-fena TUT-PK (serio 1993 = 2-a eldono kun 2000 ekzempleroj


(la maldekstra bildo estas pli granda)

Bedaŭrinde nur tre malgranda kvanto de la du eldonoj atingis Esperantistojn. La celo de tiuj TUT-PK estis propagandi Esperanton inter la ne-Esperantistoj kaj tiujn ili atingis.

Pri tiu TUT-PK ankaŭ aperis artikolo en la prestiĝa ĵurnalo: "CHONGQINGA SOCIA UNIVERSITATO.

daŭrigo; ĉinaj stampoj

Bildo de la TUT-PK "TAO XINGZHI"



Koro en la ĉina stampo: LVL 1996-27 - katalog-no: 151

En la centro de la ĉina Tao Xingzhi stampo troviĝas koro. En ĝi videblas kvar ideogramoj pri eldiro de tiu granda pedagogo. LAULUM kaj QIN KAJGI nun kune tradukis por nia informilo tiujn ideogramojn.



La du maldekstraj ideogramoj en la koro signifas: LA MONDO. AMO. Supre dekstre: PER PLENIGI. La tuta citaĵo en Esperanto (sube): PLENIGU LA MONDON PER AMO.

TAO XINGZHI, sub la influo de sia bona amiko HU Juzhi (Hujusz) li organizis en la jaro 1946 en la Universitato de CHONGQING E-kurson (fakultato?). El ĝi devenis multaj E-pioniroj de la nuna Ĉinio, ankaŭ la antaŭ nelonge forpasinta vicprezidanto de la Pekina E-Asocio: samideano ZHENG HEYAO.

Koran dankon al nia ĈKG pro la ampleksa informletero kun amaso da sciindaj detaloj. Bedaŭrinde nur etan parton eblas publikigi en nia LVL...


daŭrigo: stampoj...

Maŝinvarbstampo por la 52a kongreso de SAT-Amikaro 29a - 31a marto 1997


La varbstampo por tiu kongreso en LIMOGES estis uzita de 2a de januaro ĝis 1a de aprilo 1997. Ekzistas du diversaj datstampoj:

1 normala datstampo: LIMOGES PREFECTURE HTE.VIENNE

2 datstampo kun * P.P. * kaj LIMOGES PREFECTURE









La varbstampo estis uzata por propagandi tiun SAT-Amikaran kongreson en LIMOGES (F).

Koran dankon pro la senditaj informoj al niaj estimataj klubaj amikoj AMOUROUX kaj SADIER.

BILD-POŜTKARTOJ

Multaj de niaj klubaj geamikoj kolektas ankaŭ E-bildpoŝtkartojn kaj de tempo al tempo sendas kopiojn pri iuj novaj E-bildkartoj. Inter ili estas nia Anna-Greta Strönne (S), Elda Dörfler (I), Jan Amouroux (F) kaj Richard Hirsch (D) kaj certe ankaŭ aliaj klubaj geamikoj. Nia kolektamiko Amouroux jam antaŭ duona jaro sendis kopiojn de la kompleta serio, eldonita okaze de la

4-a GERMANA ESPERANTO - KONGRESO 1909 EN GOTHA

La siatempe konata Esperantisto LEOPOLD SCHLAF ofertis ilin interalie en la GERMANA ESPERANTO GAZETO de 1910, no: 2.


Ilustritajn
Poŝtkartojn
pri la germana kongreso
en Gotha.
Leopold Schlaf
Dresden-Striessen
— — Behrischstrasse 41. — —

La kompleta serio konsistas el 11 pecoj kaj ekzistas en du kolor-variaĵoj:
brunkolora
bronzokolora

Sur la adresflanko troveblas la indikoj:

POSTKARTE kaj UNIVERSALA POŜTA UNIO

kaj sube:
Graphische Kunstanstalt Schlaf & Co.
Behrischstr. 1, Dresden

Serie IV. DEUTSCHER ESPERANTISTEN KONGRESS (11 KARTEN)

Sur la bildflanko troviĝas la teksto:

"4a GERMANA ESPERANTISTA KONGRESO
GOTHA, 21. - 23. MAJO, 1909"

daŭrigo: bildpoŝtkartoj de GOTHA (D)

La poŝtkartoj montras jenajn bildojn:

La estraro de la "Germana Esperanto-Ligo"	(G.E.L) (Mybs, Möbusz, Kandt)
La Konsilantaro de G.E.L.	(9 portretoj)
La konsilantaro de G.E.L.	(aliaj 9 portretoj)
Honoraj Membroj de G.E.L.	(6 portretoj)
Sen teksto	(10 portretoj)
Sen teksto Kongresa Komitato	(7 portretoj)
Salutoj de eksterlandanoj	(6 portretoj)
Salutoj de regiona E-Ligo	(7 portretoj)
"Honora Pordego kun rubando: "KORAN BONVENON"	
Teatro-aktoroj	grupfoto (7 portretoj)
Kongresanaro	grupfoto


Koran dankon al nia AMOUROUX pro sia reago al mia peto lige kun tiu ĉi bildkartoj en nia LVL. La multajn aliajn kopiojn mi utiligos por la sekvontaj numeroj de nia VERDA LUPEO.

TRIA BILDKARTO PRI LA 65A ITALA ESPERANTO-KONGRESO

Nia kluba amikino ELDA DÖRFLER nun sendis kongresan bildkarton (FERRA-RA 1996), kiu montras alian desegnaĵon ol tiuj jam montritaj en la lasta LVL. La tria bildkarto montras la kastelon kaj tekston pri la kongreso.

MILITARA POŜTO DE LA UNUA KAJ DUA MONDMILITOJ

Interesa E-filatelaĵo de la famkonata pentristo OTTO DIX (1891-1969).



daŭrigo: MILITARA POŜTO...

Temas pri interesa, mane skribita militpoŝta karto el la jaro 1915 de la soldato OTTO DIX (pr.: Diks), militservanta en la 2a maŝinpafilokompanio en la urbo Bautzen (Germanio-Saksio). Adresflanke manskribita Esperanto-teksto al fraŭlino JAKOB en Dresden, dorsflanke originala desegnaĵo de DIX.

DIX estis elstara germana pentristo, kiu praktikis Esperanton de 1910 - 1918. En la muzeo de urbo GERA troviĝas centoj da PK kaj leteroj, senditaj en Esperanto de DIX al Helene Jakob.

Nia kluba amiko DARBELLAY (Kiel) posedas memorlibron pri DIX kun multaj bildoj pri Esperanto-PK de DIX.

POŜTKARTO "TRA LA MONDO"

En la lasta LVL mi montris al vi la belan titolan paĝon de la pionira E-gazeto TRA LA MONDO el la jaro 1906 kun artikolo pri la vizito de BERTHA VON SUTTNER en la LONDONA E-KLUBO la 20-an de julio 1906. Hodiaŭ sekvas bildo de ilustrita PK, uzita tiutempe de la redakcio. Sendis ĝin la fama franca samideanino FLOURENS (pseŭdonimo;ROKSANO), kunlaborantino de TRA LA MONDO kaj ĉefredaktorino de TRA LA FILATELO.



Por mi estis interesa, ke komence de nia jarcento flugantaj anĝeloj kun E-flago kaj E-diademo propagandis Esperanton. Sur tiu ĉi poŝtkarto fluganta anĝelo kun flirtanta E-standardo trumpetas la vortojn el nia E-himno:

TRA LA MONDO IRAS FORTA VOKO

La kopiojn sendis Amouroux, dankon.

KOTIZMARKOJ DE GERMANA LABORISTA ESPERANTO-ASOCIO (GLEA) (1919)

De d-ro DETLEV BLANKE, Berlin (D), mi ricevis foton pri GLEA-membrolibro, n-ro 2442, el la jaro 1919. Sur la unua pago videblas ko-

daŭrigo: GLEA...

tizmarko kun la nominalo de 30 fenigoj. GLEA uzis ĝin kiel "aliĝmonon". Videblas en tiu glm la blazono de GLEA el la jaro 1911 (LVL 29(108), paĝo 15). Pri la mezuro kaj koloro mi ne povas ion diri, ĉar temas pri nigra-blanka foto.



LABORISTA E-PROPAGANDA GLUMARKO

Volonte mi ŝatas prezenti al vi E-glumarkojn, kiuj ne estas katalogitaj, ĉar temas pri nedatumitaj, simplaj glm. Tamen ili estas valoraj dokumentoj por E-kronikistoj (historiografoj). Mi bedaurinde nur havas modestan glm-kolekton. Tial mi nur povas prezenti tion kion mi havas. Por resti ce la laborista movado mi montras al vi maldekstre E-propaganda glm el mia kolekto kun la slogano el la KOMUNISTA MANIFESTO



PROLETARIOJ CIULANDAJ PER ESPERANTO UNUIGU

Tiu glm ekzistas en multaj kolorvariaĵoj kaj estas troveblaj sur poŝtkartoj, senditaj inter la jaroj 1922 - 1930. Ili respegulas la tiutempan entuziasmon de la laboristaj Esperantistoj en multaj landoj pere de la supre menciita slogano.

La glumarkoj estis faritaj de la aŭstra firmao KOCOUREK en Vieno.

Glumarkoj de Germana Laborista Esperanto-Asocio (GLEA)

Anna-Greta STRÖNNE skribis al la redaktoro: "... jen ricevu el mia albumo por via albumo E-glumarkojn de GLEA, ĉar ili por mi ne havas specialan intereson, sed por vi ili estas valoraj dokumentoj por via kroniko pri la historio de la laborista E-movado en Germanio/Saksio..." Ŝi donace sendis al mi la 1.-- gmk kotizmarkon, nekonatan 50-fenigan kotizmarkon, sammotivan sennominalan propagand-glumarkon kaj ...la "garantifondan" markon de 1931 de la Laborista Olimpiado. Koran dankon al ŝi. Tiel eblas al mi, hodiaŭ skribi pliajn detalojn pri tiuj glumarkoj.

GLEA - KOTIZMARKOJ (1921)

Ni jam traktis la kotizmarkon kun 1.-- gmk en la LVL 29(108), paĝo 15. Hodiaŭ sekvas pliaj detaloj (gmk=germana marko)

La 50 feniga glm havas mezuron de 40x29, dentumita kaj gumita, koloro: verda sur blanka (la alivaloraj kotizmarkoj havas la saman koloron) Tiu marko servis por la E-PROPAGANDA FONDUSO.

daŭrigo: GLEA-kotizmarko...







Ekzistas pliaj markoj kun 25 fenigoj, mezuro 45x62, samgrande ankaŭ estas la marko kun 50 fenigoj, do 2 diversaj mezuroj. Krome ekzistas la markoj kun 1,-- gmk kun inflaciaj surpresoj de 25,-- gmk kaj 50,-- gmk.

La bildon sur la marko uzis GLEA ankaŭ por propagand-glumarko kun la germana teksto: LERNU LA MONDHELPLINGVON ESPERANTO".

Sekvas pliaj detaloj pri la glumarko "2a Laborista Olimpiado 1931" (bildon vd. en LVL 29(108)). Mezuro: 31x40, dentumita kaj gumita, oranĝkolora teksto kaj bildo, la bildo montras sportiston, kiu tenas en la dekstra mano martelon. Inter la gamboj silueto de konstruaĵoj.

La siatempaj GARANTIFONDAJ MARKOJ estis venditaj al laboristaj sportuloj de la GERMANA LABORISTA SPORTULA LIGO kaj antaŭ nelonge mi vidis ĝin en kopio de membrolibro de tiu SPORTULA LIGO en la Esperanto-kroniko Schwerin (D).

ESPERANTO - KONGRESO DE LA REGIONO LANGUEDOC - ROUSSILLON

ESPERANTO
Langue Universelle
Congrés Régional
Languedoc - Roussillon
NIMES
dimanche 28 mars 1971

daŭrigo: glumarkoj...

Ĝis nun ne katalogita glumarko de tiu regiona kongreso en la urbo NIMES. okazinta dimanĉo la 28an de marto 1971.

Mezuro: 131x 97 mm memglua
Koloroj: A: nigra kaj verda sur blanka papero
B: nigra kaj verda sur flava papero
Bildo: E-stelo, akvodukto/viadukto kaj antikvaj konstruaĵoj
Teksto: vd. la bildon

Informis kaj sendis nia kolektamiko AMOUROUX. Koran dankon al li!

PRI LA KONGRESAJ GLUMARKOJ DE LA 80-A UK EN TAMPERE (FIN)

Nia Henry THOMANDER reagis al niaj demandoj pri ĝi kaj ricevis de la tiama LKK-ano Veli HÄMÄLÄINEN jenan informon:

...La grafikisto de la oficiala kongres-glumarko estis Pertti NYKÄNEN, faka grafikisto en la finna televida kanalo TV-2 en Tampere. Eldonis ĝin la LKK.



La neoficialan glumarkon (brilŝtofa) planis kaj eldonis unu el niaj veteranaj klubanoj. Li mem vendis ĝin "kaŝe", ĉar nia E-klubo en Tampere ne volis eldoni ĝin kaj konkuri kun la LKK. LKK ankaŭ ne donis la rajton publikigi ĝin.

Ankaŭ pro tiuj ĉi informoj koran dankon, estimata amiko Henry THOMANDER.

Mi bedaŭrinde ne posedas gin. Se ĝi ne havas gluon dorsflanke, ne temas pri glumarko. Se jes, tiam ĝi estas E-glumarko. Ne eblas partigi niajn glumarkojn al "oficialaj" kaj "neoficialaj". Se ni tion praktikus, du trionoj de la de ni listigitaj glumarkoj malaperus el nia katalogo. Ekzemple preskaŭ ĉiuj glm pri la jubilea UK en Varsovio 1986, pri 100 jaroj de Esperanto aŭ pri la Pekina UK aŭ la hungaraj glumarkoj, faritaj de nia iama membro RADNAI devus elfali.

Aliflanke necesas diri, ke negumitaj "markoj" ne indas katalogadon ankaŭ la lastatempaj "reprintoj" (kopioj de malnovaj glumarkoj). Tiu estis la principo de nia Reinhold JENSEN, kiu verkis nian unuan grandan glumarkkatalogon.

Rimarko de HIRSCH: Lastatempe aperis tiom da "novaj-malnovaj" glumarkoj, ke oni ne plu povas diferencigi, kiuj glm estas vere oficialaj kaj kiuj estas "faritaĵo"?

ĈU OFICIALAJ TELEFONKARTOJ POR LA UK EN PRAGO?

Nia kluba amiko PATERA reage al la informo pri la telefonkartoj por la UK en Prago en nia LVL skribas, ke li konas nur tiun de La SAT-kongreso de Straźnice kun la surpreso por la UK en Prago. Ĝi kostis 700 Kc.

daŭrigo: telefonkartoj...



Mi persone nur vizitis la ELF-AREK-kunvenon dum la UK kaj ne havis eblecon rigardi la ofertojn de tiu "pôsta-giceto" pro la multaj homoj.

Dankon pro la demando al nia PATERA, ankaŭ dankon al vi pro viaj bonaj deziroj okaze de NOVJARO.

Nia V. HASALA informis la 20an de aprilo 1997 pri tiuj telefonkartoj:

"...Okaze de la 81-a UK en Praha oni aperigis porokazan alpreson por la bezonoj de kolektantoj al la telefonkartoj de la "SAT-Kongreso" (2500 ekzempleroj)en la eldonkvanto de 250 ekzempleroj. Oni ĝin vendis ce aparta giĉeto kune kun la unua TK po 800 Kc..."

E-FILATELISTA SIMPOZIO 1998 EN PRAGO

De 10a - 13 09 1998 okazos la INTERNACIA FILATELA EKSPOZICIO PRAGA 98. La pasintaj tri ekspozicioj ĉiufoje estis bonrezultaj por ni E-Filatelistoj. Nun nia HASALA skribis al la redaktoro kaj li proponas, ke okazu kunveno de E-Filatelistoj en ĝia kadro. Krome, ke ĝi eniru la oficialan programon de la PRAGA 98. Hasala farus ĉiujn organizajn laborojn. Mi bonvenigas ĉiun tiuspecan kunvenon, sed proponas, ke CEA (Ĉeha E-Asocio) organizu kaj invitu ĝin. LVL volonte publikigos detalojn. Interesuloj jam nun tuj kontaktu HASALA:

Vlada HASALA, A. Dvorka 1, CZ-696 62 STRÁŽNICE
Tel./reg./fakso: 00420/631/332 507

ATENTU: Nova internacia telefona antaŭnumero por CZ: (00420) kaj por Slovakio (00421)

NUMISMATIKO - MEDALOJ

SUPLEMENTO POR LA KATALOGO "ESPERANTO-MEDALOJ 1912 - 1995

En la komenco de la jaro 1996 nia kluba amiko JANKOWSKI aperigis sian katalogon pri 83 medaloj el 24 landoj. Nun li informis pri novaj trovaĵoj el la jaroj 1911 kaj 1986:

FRANCIO (FR 4) 1911

Duflanka medalo el flava bronzo, memoriga al profesoro Henri DOR. kiu dum la jaroj 1907 - 1912 estis prezidanto de la

TUTMONDA ESPERANTA - KURACISTA ASOCIO

La medalo estas rektangula 80x59 mm kaj pezas 138 gramojn,

daŭrigo: NUMISMATIKO - MEDALOJ

La enskriboj de la medalo estas en 3 lingvoj:





Averso: Busto de profesoro DOR Enskriboj: VEVEY 1860 - BERNE 1866 - LYON 1877, lia aĝo, latinlingve: 76 jaroj, sube franclingva enskribo: Al doktoro Henri DOR, honora profesoro de la universitato de Bern. omaĝita de siaj kolegoj, siaj amikoj. siaj disĉiploj, LYON 1911

Reverso: Ilustraĵo, simbolanta la sciencon kaj teksto: Oftalmologia kliniko de Bern, ĝenerala revuo de la oftalmologio.

TUTMONDA ESPERANTA KURACISTA-ASOCIO kaj LA SCIENCO FORPUŜAS TENEBROJN.

LITOVIO (LT 3A)



Unuflanka argila medalo, 80 mm Ø, farita memore al la 20-jara ekzisto de la Esperanto-klubo en Kaunas.

Kvinpinta stelo, en ĝia mezo: "EK" (por la klubo), ĉirkaŭ la stelo la teksto:

XX jara jubileo
1986
KAUNAS

OFERTO * OFERTO * OFERTO * OFERTO * OFERTO * OFERTO

De la 5-a UK en Barcelona (E) ekzistas 2 serioj de bildpoŝtkartoj (BPK) po 15 pecoj po serio, do entute 30 diversaj BPK.

En aŭkcioj oni ofertas unuopajn, parte uzitajn BPK, por DM 35,-- ĝis DM 50,-- por unu karto.

Hazarde mi nun havas la eblecon oferti kelkajn seriojn de tiuj BPK je tre favora prezo. Ne-Esperantisto, kiu de tempo al tempo vizitas en Sudokcidenta Europo, ĉefe en Hispanio, la tiel nomatajn "pulmerkatojn" kaj sendas al mi jam ofte valorajn Esperantaĵojn, kiujn li povis tre favorpreze aĉeti. Inter tiuj ankaŭ estis kelkaj kompletaj serioj de tiuj BPK, kiujn mi nun favorpreze ofertas al vi. La prezo de mi estas por la 2 serioj, do 30 BPK DM 90,--, do por unu karto nur DM 3,--.

Bv. turnu vin al: Richard Hirsch.




ELF-AREK JARĈEFKUNVENO ArGe ESPERANTO
dum la Europ-Unia-Esperanto-Kongreso en Stuttgart
PENTEKOSTO 1997

La fakkunsidon de ELF-AREK partoprenis 12 geesperantistoj, el 5 landoj. El la partoprenintoj 6 ne estis membroj de nia Ligo.

Richard Hirsch kaj Hermann Heiss prezentis la servojn: gazeto (La Verda Lupeo), katalogo kaj la stampobanko. Ili informis pri sistemoj de kolektaĵoj konkurscelaj. Richard Hirsch ofertis filatelajn kovertojn, poŝtkartojn kaj glumarkojn de UK-oj kaj de aliaj Esperanto-aranĝoj.

Vigla babilado dum preskaŭ du horoj pruvis la grandan intereson pri nia temo: Esperanto-filatelio.

Dum la solena fermo de kongreso Lothar Eckert raportis al la plenkunveno pri nia fakkunsido.



Informilo de ELF-AREK (Esperanto-Ligo Filatelista * Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj
Offizelles Organ der ArGe Esperanto (laborgrupo Esperanto de la germana VdPh = Asocio de la germanaj Filatelaj Laborgrupoj)

Redaktoro: Rudolf Burmeister, Max-Müller-Str.62, DE-09123 CHEMNITZ

Prezidanto: Hermann Heiss, Lohstr. 42, DE-77704 OBERKIRCH

Kasisto: Rolf Beau, Saxoniastr. 35, DE-04451 ALTHEN

Bankoj: Sparkasse Leipzig Konto-No: 1 190 223 208
Bankkodo (BLZ): 860 555 92

Postbanko Nürnberg: Konto-No: B36 6737-855
Bankkodo (BLZ): 760 100 85

UEA-konto: elfx-r

Kotizoj 1997: okcidentanoj: DM 30,--
orientanoj: DM 20,--

Stampobanko: Werner Heimlich, Fröbelstr. 4, DE-29614 SOLTAU

Kompostis, presis kaj ekspedis: Richard Hirsch, Lambertstr. 12
(katalog-prilaboranto) DE-36251 BAD HERSFELD